n-ro 76

aprilo 2002

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## ICC500 pri dokumentaj kreditoj tradukata

IKEF-teamo estas tradukanta broŝuron de Internacia Komerca Ĉambro pri dokumentaj kreditoj. La traduko verŝajne aperos en junio. Fidelaj IKEF-membroj kiuj pagis minimume 5 jarkotizojn, inkluzive de la kotizo por la nuna jaro, aŭtomate ricevos la broŝuron. La aliaj ankoraŭ havas tempon por enordigi sian kotizpagon por 2002. Novaj membroj povas antaŭpagi kotizo(j)n por atingi 5 kotizjarojn.

## IKEF-retpaĝoj translokiĝis

Kvankam la ĉefa retadreso de IKEF estas www.ikef.org, la paĝoj reale troviĝis ĝis nun je http://www.xs4all.be/~rotsaert/ikef. Tiu lasta adreso ŝanĝiĝis al al http://users.pandora.be/ikef.

Roland Rotsaert <ikef(a)pandora.be> aŭ <roland.rotsaert(a)pandora.be>

## Enhavo


| | |
|---|---|
| Administrado - Aprobro de la jarraportoj - Elektoj | 3 |
| Raporto pri la agado dum la jaro 201 | 4-5-8-9 |
| Financa raporto | 6-7-9 |
| Komercaj petoj kaj proponoj | 10-11 |
| EJA - Anoncita aranĝo - Novaj membroj - Novaj adresoj - Opinioj | 12 |

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: Laŭokaza Novajletero) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

---

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/

---

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptataj. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al FEL.

**Kontoj**: - ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB, IBAN: BE14 0001 5926 2983.)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso 03-233.54.33, reto financoj(a)fel.esperanto.be)

Ĉ*inio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), tel. kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)



*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama (a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

**Administrado - Grava atentigo al niaj membroj:**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2001 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 6-7-9 la financan raporton de IKEF por la jaro 2001, notante ke la ciferoj estas prezentitaj al la revizoro je 21 marto 2002. Je redaktofino (1 aprilo 2002) la respondo de la revizoro ne estis ricevita. Ni informos la membrojn pri lia opinio en la venonta numero.

3. La estraro notas la sumon de financa neta malgajno de 446,09 EUR kaj proponas deprenon de tiu malgajno de la kapitalo.

4. La estraranoj s-ro Franz Josef BRAUN (prezidanto, IKEF 4), d-ro Rainer KURZ (IKEF 235) kaj s-ro WANG Tianyi (IKEF 117), ĉiuj elektitaj en 2000 dum la UK en Tel-Avivo, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas denove kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia Statuto, alineo 7.4, montras la proceson pri aprobo de la raportoj pri agado kaj financo. Ĉi-jare ni ne aranĝos oficialan Ĝeneralan Kunvenon dum la Universala Kongreso en Fortaleza (Brazilo). Por tia kazo la Statuto preskribas ke aprobo de ambaŭ raportoj sekvos aŭtomate du monatojn post publikigo, krom se pli ol duono de la membroj skribe al la Ĝenerala Sekretario (Prezidanto) indikas malakcepton. Do, se vi intencas malaprobi la raportojn, bonvolu tion indiki al la prezidanto kun nomigo de kaŭzoj plej malfrue du monatojn post ricevo de ĉi tiu numero de La Merkato.

6. Nia Statuto, alineo 8, montras la procedon pri elekto de estraranoj. Ĉar ĉi-jare ne okazos oficiala Ĝenerala Kunveno, la elekto de membroj de la estraro okazos per skriba voĉdonado perpoŝte. Bonvolu sendi ĝis 2002-05-31 vian elekton skribe al nia estrarano Francois Xavier GILBERT, 33 rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (Francio), retadreso EFIKSO(a)aol.com, kiu administras la elektan procedon. Ĉiu membro havas 3 voĉojn, ĉu por reelekto de estraranoj menciitaj en paragrafo 4, ĉu por nomi aliajn kandidatojn.

7. Tamen IKEF okazigos kadre de la Universala Kongreso en Fortaleza informkunvenon, en kiu ni diskutos kun ĉeestantaj membroj kaj aliaj interesatoj pri celoj kaj agadoj de IKEF. La precizan daton kaj horon kaj la salonon de la informkunveno ni avizos en la venonta numero de La Merkato. Krome okazos informkunveno dum la 5-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Verona (Italio) je 23-28 aŭgusto 2002.

<u>**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2001**</u>

**Membronombro samnivele kiel en la antaŭa jaro**

Kun 145 membroj fine de la jaro 2001 nia membraro restis sur la sama nivelo kompare al la antaŭa jaro. Dum 2001 aliĝis 14 novaj membroj, bedaŭrinde ni perdis la saman nombron (1 pro morto, 3 pro persona eksiĝo, 10 pro eksigo fare de la estraro pro nepago de kotizo). La 145 membroj venas el 42 landoj, inter ili 19 el Germanio kaj 18 el Ĉinio, landoj kun plej alta nombro. Inter ĉiuj troviĝas 8 dumvivaj. La nombro de perantoj fine de 2001 restis 7.

**'La Merkato' regule aperis**

Ankaŭ dum 2001 nia interkomunikilo 'La Merkato' regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

**Terminara Sekcio sur bona vojo**

Post eldono de 'Incoterms 2000' en la jaro 2000, nia Terminara Sekcio komencis fine de 2001 la esperantigon de simila eldonaĵo de ICC (Internacia Ĉambro pri Komerco en Parizo), nome 'Uniform Customs and Practice for Documentary Credits, UCP 500' (Unuformaj Kutimoj kaj Praktiko por Dokumentaj Kreditoj). En la traduklaboro partoprenas sub respondeca kunordigo de s-ro YAMASAKI Seiko (IKEF 43) kvin aliaj IKEF-membroj. La plano eldoni ĝin ĝis meze de la kuranta jaro por prezenti ĝin dum la Universala Kongreso en Fortaleza estas realisma.

**Verka agado kreskis**

La verka agado, kiu okazas precipe en 'Monato', internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, dum 2001 nete kreskis, kaj laŭ la nombro de kontribuoj (entute 40) kaj laŭ la nombro de verkantaj IKEF-membroj (8). Jen la 8 aŭtoroj: Bruno FLOCHON (IKEF 279), Gilbert LEDON (IKEF 177), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Roland ROTSAERT (IKEF 3), Bo SANDELIN (IKEF 134), YAMASAKI Seiko (IKEF 43) kaj Zandandu Ntomono ZOLA (IKEF 181).

Krom tiu ĵus antaŭe menciita verkado, Bo SANDELIN aperigis serion de artikoloj en 6 numeroj de 'Monato' kun la titolo 'Historio de la ekonomia pensado'. Pli ampleksa versio de tiu serio estas eldonota en libroformo en Leins Verlag, Germanio.

Malgraŭ tio laŭdinda progreso ni devas konstati, ke por grandaj mondopartoj ankoraŭ



ne estas kunlaborantoj por 'Monato', kvankam loĝas tie IKEF-anoj. Kiu havas talenton por verkado, tiu anoncu sin al 'Monato' kiel verkanto (= pagata laboro). Ĉe tio okazo, ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke 'Monato' rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de 'Monato'. Enhavo, aspekto kaj cetera kvalito de tiu magazino lastatempe daŭre kaj profesiece pliboniĝis.

Plie aperis en nia interkomunikilo 'La Merkato' kelkaj artikoloj pri ekonomiaj temoj, i.a. aparte menciinda 'Mallonga superrigardo de la internacia patent-sistemo' de Roland ROTSAERT en la numero 73 sur paĝoj 10-17.

**Kongresaj aranĝoj**

Dum la 86-a UK en Zagrebo okazis je 26 julio 2001 la Ĝenerala Kunveno de IKEF kun 51 ĉeestintoj, inter tiuj 26 membroj. Tio estas laŭnombre la dua plej granda iam ajn (rekordo: Berlino 1999 kun 55 ĉeestintoj).

Ĉe la estrara tablo sidis 5 el 7 estraranoj, nome prezidanto Franz Josef BRAUN, financa konsilanto Roland ROTSAERT, estraranoj Francois Xavier GILBERT, KÖNYVES Zoltán kaj YAMASAKI Seiko. La kunveno plenumiĝis laŭ la tagordo. La raporto pri agado de IKEF kaj la financa raporto por 2000 estis aprobitaj, kaj sub gvidado de nia revizoro d-ro Gianfranco POLERANI la Estraro estis malŝarĝita. En la elekto estis reelektitaj por dujara oficperiodo la estraranoj Gilbert, Könyves kaj Rotsaert. Sur la lokon de Yamasaki kiu ne plu kandidatiĝis, la asembleo elektis prof-ron OOBA Atsuo (IKEF 75) el Japanio.

Prezidanto Braun varme dankis al s-ro Yamasaki pro ties ĉiam aktiva kaj efika laboro en la 14 jaroj de lia estrara periodo, kaj ankaŭ pro lia preteco daŭrigi la oficon de kunordiganto de la Terminara Sekcio.

Ĉefaj temoj en la diskutado estis pli rapida starigo de aktualaj terminaroj pri la fakoj ekonomio kaj komerco, t.e. plifortigo de la terminara laboro, krome la neceso por pli aktiva helpo al komercado inter esperantistaj komercistoj, fine la starigo de elektronika membrolisto kun indiko de specialaj kapabloj de ĉiu membro.

Tre interesa kaj informriĉa estis la vizito en la Ekonomia Ĉambro en Zagrebo unu tagon poste. 25-persona grupo de IKEF-anoj kaj interesatoj, inter tiuj UEA-prezidinto Grégroire Maertens kaj la germana nobelpremiito por ekonomio, profesoro Reinhard Selten partoprenis. Nia membro Mag. Radenko MILOSEVIC (IKEF 308), estro de la sekcio pri makroekonomia politiko en tiu Ĉambro, en perfekta maniero kaj kun modernaj rimedoj faris sian prelegon. Ĝia enhavo pritraktis la aktualan ne facilan

situacion de la kroatia ekonomio kaj la specifajn problemojn de transira ŝtato, kia estas Kroatio. Vigla diskutado kaj posta frandaĵa koktelo finis tiun eksterordinare bonan aranĝon.

**Komercado inter Komercistoj Esperantistaj**

En ĉiu numero de 'La Merkato' aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj. Ni aperigas ilin senpage. La nombro de tiuj en 2001 estis kun 23 iom pli alta ol antaŭe (21).

Plian instigon al komercado per Esperanto ni ricevis per retlisto per-esperanto-komerco(a)yahoogroups.com, kiun establis por IKEF UEA-prezidanto Renato Corsetti, kaj kiun nun administras nia membro Santiago ALVAREZ (IKEF 307).

Krome en la retejo www.komerco.com, administrata de nia ĉina peranto kaj estrarano WANG Tianyi, same eblas negocado. Plie estas establita tie babilejo, kie esperantistoj interesataj pri komerco povas interkonatiĝi kaj elŝanĝi opiniojn kaj fari ofertojn.

Aparte niaj ĉinaj membroj aktive kaj fervore negocadas kun alilandaj Esperantistaj komercistoj. La IKEF-reto bone funkcias. El la plendo de afrika aĉetinto pri liverado de varoj kun ne-adekvata kvalito fare de alilanda liveranto ni eksciis pri tio, ke efektive okazas komerco surbaze de Esperanto. Tamen, ni devas atentigi al tio, ke IKEF neniel respondecas pri la kvalito de liveritaj varoj aŭ plenumitaj servoj anoncitaj en La Merkato aŭ aliloke, kaj tial IKEF ne zorgas al iu ajn komerca akuzo.

**<u>Unua komuna seminario de IKEF kun TAKE en Storckensohn (Francio) sukcesa</u>**

Eble la plej grava agado en la jaro 2001 estis la tritaga seminario organizita komume de IKEF kaj nia partnera asocio TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) kadre de staĝo de 'Espéranto France Est' kies prezidinto estas nia estrarano François Xavier GILBERT (IKEF 14). Ĝi okazis je 20-22 aprilo 2001 en Storckensohn (montar-vilaĝo en sudaj Vogezoj, orienta Francio). Kadre de la tuta programo okazis 10 prelegoj el la fakoj de IKEF kaj TAKE (Prelegintoj flanke de IKEF: Franz Josef BRAUN, KÖNYVES Zoltán, d-ro Rainer KURZ). Bedaŭrinde la nombro de ĉeestantaj IKEF-membroj estis nur 10. Entute 81 personoj partoprenis la staĝon, el tiuj regule proksimume 30 spektis la prelegojn en la seminario.

En la organo de TAKE, la revuo 'LA DOMO' de julio 2001 aperis pri ĉiuj 10 prelegoj resumo. Kiel eksterordinaran servon por niaj membroj, la estraro de IKEF decidis kaj plenumis la alsendon de tiu numero de LA DOMO senkoste al ĉiuj membroj de IKEF.

**Retpaĝaro de IKEF**

Nia estrarano kaj ĉina peranto, s-ro WANG Tianyi (IKEF 117, komerco(a)public.xa.sn.cn) daŭre registras, aktualigas kaj disdonas al niaj membroj kun retaliĝo la retadresaron de IKEF-membroj. Informu lin pri nova aliĝo aŭ adreso.

Dank' al afabla helpa laboro de s-ro Stefan Fisahn, Stuttgart (Germanio, ne membro de IKEF) la retpaĝaro de IKEF (www.ikef.org) ricevis pli modernan aspekton.

**Speciala agado: Intervjuo kun profesoro Reinhard Selten**

Nia estrarano d-ro Rainer KURZ faris intervjuon trilingvan (germane/angle/Esperanto) kun kaj pri profesoro Reinhard Selten, Nobel-premiito pri ekonomio (pro lia 'ludoteori-o') el Germanio. IKEF subvenciis tiun agado per 250 EUR. Pro tio ni ricevos kopion esperantlingvan de la videobendo, kiun ni povos pruntedoni al interesataj membroj.

**Resumo**

2001 estis por IKEF jaro relative sukcesa. La membronombro restis stabila, kvankam ne-akurata eniro de kotizopagoj ne kontentigas. Kelkaj agadoj estas sur rimarkinda nivelo (Terminara Sekcio, verka agado, kongresaj aranĝoj), kelkaj pliboniĝis (retpaĝaro modernigita, per-esperanto-komercado instigita), la kunelaboro kun nia partnera asocio TAKE kulminis en komune organizita semiario pri fakaj temoj kaj tute nove okazis la intervjuo kun renoma sciencisto pri ekonomio. Alikaze ne plu aperis esperantlingvaj reklamanoncoj por firmaoj aŭ aliaj pagitaj servoj kiel tradukado por firmaoj. Tio kun aliaj faktoroj kondukis denove al negativa financa rezulto. En la venontaj jaroj ni devos meti la fokuson aparte al tiuj agadoj.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN <f.j.braun(a)t-online.de>

**<u>Financa raporto pri la jaro 2001 (spezokonto kaj bilanco troviĝas je la p. 6-7)</u>**

La IKEF-librotenado montras fine de 2001 negativan rezulton je 446,09 EUR. La ĉefa klarigo estas la kotizoj, kiuj dum la pasintaj jaroj atingis pr. 1.500 EUR, sed en 2001 stagnis je 1.125,43 EUR.

Du projektoj kiujn IKEF kunorganizis ankaŭ kaŭzis elspezojn: la aranĝo de seminario kun TAKE (kies kostoj faritaj tamen estis grandparte repagitaj el la profito de la aranĝo; nur restis por IKEF la kosto de sendo de La Merkato al ĉiuj TAKE-membroj, taksita je 100 EUR) kaj kontribuo al vidbenda intervjuo kun Prof. Selten (250 EUR).

Aliflanke dum 2001 mankis kelkaj eroj kiuj dum antaŭaj jaroj pozitive influis la



rezulton: ne estis novaj eldonoj kaj estis varbita neniu reklamo por Monato.

Fine, mi dankas jenajn membrojn, kiuj donacis sumon al la IKEF-kaso dum la pasinta jaro: s-rojn Braun (160 EUR), Bühl (20 EUR), Matubara (8 EUR).

Roland Rotsaert, kasisto <ikef(a)pandora.be>

**<u>Komercaj petoj kaj proponoj</u>**

IKEF senpage aperigas komercajn ofertojn, laŭ peto de membro aŭ de alia petanto. Tamen, ĝi ne kapablas kontroli la kvaliton de la ofertoj. Estas la respondeco de komercistoj laŭ kutimaj proceduroj esplori la fidindecon de la ebla nova partnero kaj/aŭ per specialaj teknikoj limigi la riskon.

**Ĉeĥio**

Vladislav HASALA kun ĉeĥa komerca ĉambro planas jenajn negocvojaĝojn en 2002: Bruselo (aprilo), Londono (majo), Stuttgart (junio), Utrecht (oktobro), Milano (novembro). Krome je 14 novembro okazos internacia negocaranĝo en Brno. Kontaktu lin fakse je +420-631-332507, rete je vlada_hasala(a)oil.cz, www.ohkbrno.cz/caviar.

**Ĉinio**

MMDS Sub Konvertoro (MMDS Down Converter) servas al parabola anteno, per kiu familio povas kapti satelitajn TV-programojn rekte el la satelito, kaj plue radie dissendi ĉ. 50-80 km al aliaj. Ni serĉas kunlaborantojn por eksporti la konvertorojn kaj koncernajn aparatojn, kaj eĉ por kune fondi la TV-stacion, kiu dissendas. S-ro WANG Tianyi, Tongchuan Foreign Trade Co., Adr. Jian-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an; tel. 0086-29-2242215, fakso 0086-29-2232952, rete komerco(a)public.xa.sn.cn, informo(a)komerco.com. [Informoj pri MMDS i.a. je www.bstuner.com.tw, www.wcai.com, www.eclips.be, www.satvision.com, www.amplired.com.ar - rr]

Mia kompanio liveras autopartojn faritajn de kaŭĉuko-plasto. Ĝi ankaŭ jam plurajn jarojn produktas ligno- kaj ŝtono-skulptaĵojn. La kompanio havas bonajn sperton kaj servon. Interesito kontaktu min: S-ro Zhengsu HUANG, Anhui United Enterprises Trade. Co. Ltd, <auetr(a)mail.hf.ah.cn>; fakso 0086-551-2840631.

Mi loĝas en la Shijiazhuang-urbego, nur 400 kilometroj al ĉefurbo Pekino. Tie ĉi trovigas la plej grandaj merkatoj de teksaĵoj, diversaj komercetaĵoj, agrikulturaĵoj kaj libroj. Mi povas liveri diversajn valorajn informojn kaj servojn pri ĉina komerco pri ĉiutagaj necesaĵoj, nutura mangaĵo, metiartaĵo, kuracherboj, kaj oferti konsultojn en investo, transpatento, tekniko, prilabro, ktp. S-ro Zhangci (IKEF 274), Department of Material Science Engineering, Shijiazhuang Railway Institute, CN-050043 Shijiazhuang, Hebei; retpoŝto: zhangci(a)ineast.com;
interrete: http://esperanto.ineast.com/east_word/business.htm.

**Hungario**

Ni interesiĝas pri agentejoj por diversaj produktoj. Niaj servoj: akiro de nemoveblaĵo kun posedrajta enskribo, dungoj en la vestaĵindustrio, diversaj lignaĵoj, elektraj muntlaboradoj en eksterlando, ktp. Ni ofertas elastajn platojn kaj brikojn (el dispecetigitaj aŭto-pneŭmatikoj, kaŭĉuko) en diversaj formoj, utilajn por sport- kaj ludplacoj (protektas kontraŭ fal-akcidentoj), stratoj, ktp; tralasas akvon kaj aeron, rezistas froston kaj sunlumon. Kontaktu: S-ron Szilágyi Dezsö, ELAN Kft., Füredi út 6. V/1., H-7400 KAPOSVÁR; tel. kaj fakso 00-36-82-316-894, mobila 00-36-20-977-83-77.

**Irano**

"Mahvar Network" havas 3-jaran sperton en la kampo de la Interreto. Iranaj interreto-uzantoj tute ne kapablas aĉeti ion ie tra la Interreto ĉar por ili ne eblas pagi per Visa, Master Card kaj similaj kartoj. Nia kompanio ellaboris solvon laŭ kiu irana kliento antaŭpagas la mendon kaj eksterlanda partnero efektivigas la mendon ĉe la liveranto. Interesito por partnereco kontaktu: Sadegh Karami (IKEF 286), Direktoro de E-komerca Departmento en Mahvar Network , P.O. Kesto 6864, IR-15875 Tehran, Tel/Fakso +98 21 2204000, E-poŝto (oficeja) e-commerce(a)mahvar.com, E-poŝto (hejma) karami_s(a)yahoo.com.

**Italio**

COIMBA fondiĝis en 1979 kiel faka kompanio por importo de bananoj, sed la familio Albini estis aktiva en la sektoro de legomoj kaj fruktoj ekde 1932. Ekde 1986, COIMBA ŝanĝis sian aktivecon adresante la energiojn al la disvolvado de internaciaj aferoj en malsamspecaj agadsektoroj. Hodiaux ĝi liveras diversajn servojn: merkatajn esplorojn kaj enketon, agentejon, k.s. La ‘IBN-NETWORK’, administrata de COIMBA, estas reto por speficaj komercaj kontaktoj en- kaj eksterlandaj. Kontaktu: COIMBA, Via G. Prati 17, I-37124 VERONA, fakso 045-8306557, rete albini(a)sis.it.



**Pakistano**

Mi eksportas pilkojn de bona kvalito. Altaf Gohar Khan (IKEF 259), rete <al_gohar(a)hotmail.com>, mobila tel. +92-320-4901498, oficeja:+92-51-2273243

**Rusio**

Min interesas kunlaboro tutmonde pri konstruado de TTT-paĝaroj diverslingvaj, retaj vendejoj, ktp, kaj traduka komerco. Atendas proponojn kaj ideojn retpoŝte. Vadim <wwb(a)perm.raid.ru> (Perm).

**Esperanta Jura Asocio (EJA)**

EJA kaj sia revuo 'Jura Tribuno Internacia' havas novan adreson: p.a. José María Rodríguez Hernández, Apartado de Correos 3142, E-14080 Córdoba (Hispanio); rete esperanto14(a)supercable.es. Novaj membroj kaj kontribuoj por la revuo estas bonvenaj. Ankaŭ estas nova interretpaĝaro: http://es.geocities.com/ejaaeu/index.htm.

**Anoncita aranĝo: Krefeld, Germanio 19-24 aŭgusto 2002**

Unuan fojon, ekde la fondiĝo, la Internacia Naturkuracista Asocio organizas 6-tagan konferencon en Eŭropo (19-24.08.2002 en Krefeld, Germanio). Estas invitataj ne nur INA-membroj sed ankaŭ ĉiuj, kiuj opinias naturkuracadon estonto de la medicino kaj kiuj volas scii detalojn de sana senmedikamenta vivmaniero. Eblos preni seancojn de naturkuracado por pluraj malsanoj. Detaloj ĉe INA-sekretario: Anatolo Gonĉarov, p/k 65, Sankt-Peterburg, RU-197022, Rusio; rete: <anatolog(a)mail.ru>.

**Novaj membroj**

318. Henri SCHUTTERS, Panhovenstraat 10, B-3990 PEER, Belgio, <henri.schutters(a)skynet.be>
319. S-ro Vincent LARNICOL, 72 B, Av. Foch, F-92260 FONTENOY AUX ROSES, Francio

**Novaj (ret)adresoj:**

101. Georges Sossois, Belgio: <george.sossois(a)compaqnet.be>
148.Yvon POUPEAU, 21 rue de la Forêt, F-77930 Fleury en Bière, Francio
213. MU Binghua, Honghua nanlu 38 hao 9-2-5, CN-610081 CHENGDU, Ĉinio
250. Silvio Kniess Mates, Rua: Tte. Silveira, 199 sala 102, Centro - Florianópolis - SC, 88010-300, Brazilo; <silvio(a)moldamerica.com.br>
297. Henadzi Kurhun: <kurhun(a)tut.by>
312. Abonasoft: <abonasoft(a)pro.hu>; http://abonasoft.netfirms.com
313. Bernard BEHRA, Francio <bernard.behra(a)wanadoo.fr>

**Kelkaj opinioj pri komerco kaj Esperanto**

* Ni, esperantistaj komercistoj, devas agi laŭ reguloj pri internacia komerco kaj starigi fidon. Sen fido fari komercon esti malfacila kaj ne eblos sukceso.
* Se oni provizas informojn kaj varajn prezojn, tiuj devas esti veraj.
* Esperantistaj komercistoj devas altigi sian scion pri Esperanto.

Chen jinyin (Chen Dinshu) IKEF 302 <gemidolf100128(a)sohu.com>